# La homo kaj ĝia sorto

de Martinus

## *La mistero de sufero*

La homaro vivas en oceano da malfacilaĵoj kiel krizoj, militoj, malsanoj, malvirtoj kaj diboĉoj. Se tio estus la sola bildo de la vivo, do tiu situacio ŝajne estas la plej klara bildo de maljusto. Ni vidas ke iuj estuloj aperas en la mondo kun tutviva sorto kiel malsanuloj, invalidoj aŭ kun aliaj malfacilaĵoj. Kaj ni vidas ankaŭ ke aliaj naskiĝas en tre ĉarma kaj agrablega vivo. Tiu situacio kun la multaj suferoj estis granda enigmo por la homoj. En la kristana mondo oni klopodis klarigi ke tiuj suferoj estas sekvo de la pekoj kiujn la homoj faris. La suferoj estis puno. Malbeno trafis la homojn pro iliaj pekoj. Ni scias ankau ke Dio diris al Adam: “En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon”.(Gen.3.19). La tero estu malbenita ĉar li pekis. Tio estas prezentita tiel draste, ĉar temas pri adapto al menso sen profunda kompreno pri tio kio efektive okazas.

## *La perfekteco de la naturo*

Observante la kreoprocesojn de la naturo de komenco ĝis fino ni vidas ke neniam ĝi kreas finan rezulton kiu ne estas ĝojo kaj beno por la vivaj estuloj. Alie ja estus strange se la homoj devus ricevi tian neperfektan sorton. Observante nian propran organismon ni vidas ke ĝi estas treege perfekte ekipita. Ni havas okulojn per kiuj vidi, ni havas orelojn per kiuj aŭdi, kaj ni povas paroli. Ni havas organismon kun tiuj multaj organoj kiuj kunefikas favore al la tutaĵo, kaj pro kiuj ni povas travivi la vivon. Ne ekzistas io nelogika en la konstruo de nia organismo, ĉio estas logike kreita. Se la okuloj estus sur la dorso, aŭ se la flarsenso estus proksima al la kloako ktp., tiam ĝi estus neperfekta, sed tiel ne estas. Eĉ en ĉiu unuopa eta mikroskopa parto la aranĝo estas absolute perfekta.

## *La kreado je la hereda peko kaj la graco*

La infana instruo diras al ni ke la sufero estas puno, kaj ke ni ĉiuj estas malbenitaj kaj naskitaj kun puno. Ni povas saviĝi nur per peto pri tiu pardono kiun povas doni la graco pro la krucumo de Jesuo. Sed tio ne povas rezisti kontraŭ la klara vido de la intelekteco, ĉar neniam ajn povas esti ĝuste ke senkulpa homo povas suferi pro aliaj. Absolute ne troviĝas homoj, kiuj povas suferi pro aliaj. Estus strange havi tian praktikadon en la moderna justico. Se ekzemple viro estus juĝita al tiom aŭ tiom da jaroj en malliberejo, tiam estus strange se alia viro dirus: ”Ĉu mi rajtas transpreni lian punon?” – ”Jes, tion vi bone povas!” Tiam la rabisto aŭ bandito liberiĝas, kaj la alia havos la punon. Tio estus absolute sensenca. Tial multaj homoj fariĝis nekredantoj. La pli intelekte sintenaj homoj ne kredas je la graco, la hereda peko, la puno ktp. Male ili mem komencis serĉi la solvon. Sed por tio necesas pli altaj kapabloj, kaj sekve ili ne povis trovi la tutan solvon.

## *Kion ni povas lerni observante la vivon*

La moderna scienco atingis tre multe rezulte de peso kaj mezuro, sed ĝi povas observi nur de malsupre, de la fizika regiono kiu estas la plej malgranda parto de la vivo. La multe pli

granda parto estas la nevidebla spirita parto, kaj ĝuste ĝi donas la solvon. Kiam troviĝas en la fizika naturo regionoj kie la fenomenoj ŝajne ne estas ĝojo kaj beno, do tio montras ke ili ne estas finevoluintaj. Per tio oni povas kompreni ke ankoraŭ la tera homaro ne estas fina, ankoraŭ mankas multe. Tio ne signifas ke ĝi estas "peka", ĉar ne ekzistas ia ajn "peko". Male ekzistas neperfekteco kaj granda nescio.

La homoj ne ĉiam scias kion ili faras, kaj tio estas tute natura ĉar la tuta fizika vivo estas destinita ekskluzive al tio ke la homoj povas eksperimenti. Ili povas fari kion ili volas. Dio diris al Kain: ”Se vi agos bone vi estos forta, sed se vi agos malbone la peko kuŝas ĉe la pordo”.(Gen. 4.7). Tio ja signifas, ”se vi agos bone”, tiam ĉio estos feliĉa kaj agrablega por vi, sed ”se vi agos malbone”, tiam la neperfekteco, la malsanoj kaj la malbono ĉirkaŭos vin. La homoj sekve povas fari kion ili volas. Tial estas tre grave encerbigi al la homoj kion ili faru, kaj kion ili ne faru. Tion alia homo ne povas fari, sed la tuta fizika mondo estas aranĝita tiel ke ĝi donas al la homoj la rezulton de ilia propra agmaniero.

Ĉiu substanco havas siajn specialajn strukturon kaj reagokapablon, salo havas sian, sukero havas sian ktp. La materio havas siajn reagojn kiuj necesigas specialajn kondiĉojn por ke kreado povu fariĝi perfekta. Se tiuj kondiĉoj ne plenumiĝas, tiam okazos katastrofo. Kiam oni volas ion konstrui, oni bezonas koni la substancojn por ke tio povu fariĝi logika. Sed kion signifas tio ke ĝi estas logika? – Tio signifas ke ĝi estas konstruita tiel ke en sia fina rezulto estas ĝojo kaj beno por vivaj estuloj. Necesas konstrui tiel, senkonsidere ĉu temas pri domo, maŝino aŭ konduto. Tion oni ne bezonas kredi, tion oni povas observi.

## *La evoluŝtuparo kaj la sortoleĝo*

La homoj evoluis de la bestoj, kaj ni povas vidi ke la plej malaltnivelaj homoj ne estas tre malproksimaj de la plej alte evoluintaj bestoj, kaj ni povas vidi ke tiuj homoj tute ne havas tiun intelektan komprenon, tiun kreokapablon kaj tiun talenton kiun havas la moderna kulturhomo. La unuopa homo troviĝas ie en kreado. Ĉe la naskiĝo iuj troviĝas en loko kiun aliaj preterpasis antaŭ longe. Iuj mortas en stadio kie aliaj naskiĝas. Ni vidas ke la alte evoluintaj homoj faris en antaŭaj vivoj progresojn kiujn eble nur nuntempe aliaj malpli evoluintaj homoj komencas. Ni vidas ke la homoj ne troviĝas en la sama stadio, ekzistas ja multaj diversaj evolustadioj, ja eĉ tuta vico aŭ skalo da pli aŭ malpli perfektaj ŝtupoj. Kiel tiuj ŝtupoj povus estiĝi se la estuloj ne pliboniĝus de unu vivo al alia?

La nuntempa tera vivo estas rezulto de antaŭaj vivoj, kaj tiel same ĝi estas la fundamento por nia sorto en venontaj vivoj. Eterna neskuebla leĝo estas la jena: ”Ĉion, kion oni semas, tion oni ankaŭ rikoltos”. (Gal.6.7).

## *La reenkarniĝo kaj la talentokerna principo*

Tiu evoluŝtuparo montras al ni ke la vivo ne finas per tio kion ni nomas ”la morto”, sed ke ĝi daŭras, kaj ke la estuloj naskiĝas denove. Se ne estus tiel, la estuloj ja ne povus naskiĝi kun specialaj dispozicioj, ekzemple kun artaj kapabloj, kaj tute ne havus signifon ke la homo evoluigas artan talenton. Kiel utilus ke dum tuta vivo la homo trejnas, ekzercas tage kaj nokte por lertigi sin en speciala arto, se ĝi devus vere morti? –Sed male estas bonege ke la homo povas naskiĝi kun tiuj kapabloj kiujn ĝi evoluigis, kaj povas

komenci en tiu stadio kiun ĝi atingis en la pasinta vivo. La reenkarniĝo aŭ tiu tuta ĉeno de teraj vivoj montros al ni ke vere ekzistas justo.

## *La leĝo de la vivo*

Tiel longe kiel la homoj ne estas perfektaj ili ne povas plenumi la leĝon de la vivo: ”Amu vian proksimulon kiel vin mem”(Mat. 22.39). La celo de la evoluo estas atingi antaŭen al la kapablo ami sian proksimulon kiel sin mem. Sed tio estas tute malebla por la nefina homo ĉar ĝi estas organe konstruita por tute alia formo de praktikado de simpatico, kaj necesas ke unue ĝi atingu kulminon kaj estu fintravivita. Per tio la homo atingos novan formon de simpatiaj dispozicioj per kiuj ĝi atingos la kapablon ami ĉiujn. Tio ne estas enamiĝo, tio ne estas produkto de hormonoj kaj forigitaj sekrecioj, sed male estas vera animstato kiu estiĝas tiel ke oni povas ami sian proksimulon kiel sin mem.

## *La mondsituacio*

Nuntempe ekzistas multaj kiuj amas sin mem tiel multe ke ili preskaŭ ne amas ion alian, kaj ĝuste tio faras ke la mondo venas en militojn kaj en la multajn aliajn malfeliĉajn statojn. Antaŭ longe la tero finevoluis. Ĝi prezentas ĉiujn eblajn cirkonstancojn por esti la plej eminenta kaj lumanta planedo sur kiu vivi. Ĝiaj cirkonstancoj de klimato kaj lumo apartenas al la plej luksaj en la sunsistemo. Neniuj bezonus malsati kaj frosti. Neniuj bezonus esti malriĉaj kaj malsanaj. Sed tamen la fakta situacio estas necesa. Tion kaŭzas la nefina stato de la homoj kaj ne de la planedo. La homoj posedas aŭ ricevis tiun planedon,sed inter si ili batalas pri ĝi. Tiu situacio estas precize la sama kiel tiu kie oni ĵetas karnon en kaĝon kun rabobestoj. La plej fortaj prenas la plej grandajn pecojn, dum aliaj eble tute nenion ricevas. Same ni vidas ke iuj homoj estas tre malriĉaj kaj sen nutraĵoj kaj vestoj, dum aliaj estas miliarduloj, havas abundajn riĉaĵojn, ja milojn da fojoj pli ol tio kion ili bezonas por vivi en unu vivo.

Tion oni ne povas prave kritiki. Tio estas natura sekvo de tiu ŝtupo sur kiu troviĝas la homoj. Estas tre grave ekvidi ke entute ne ekzistas kaŭzo kritiki aliajn homojn kaj esti amara, kolera kaj envia. Ĝuste tiaj sintenoj kreas malfeliĉojn kaj suferojn. La homoj mem havas la taskon ŝanĝi tiun situacion en la futuro.

## *Religio, naturscienco kaj spirita scienco*

Sed la homo havas limigitajn eblojn por ŝanĝi sin. Unue necesas kompreni kion oni necese ŝanĝu. Nuntempe la homoj tre altgrade havas la sintenon ke necesas scienco por krei en la materia sfero. Sed kial tio estu scienca? –Tio necesas por ke la kreado povu fariĝi logika. Surbaze de scienca observado oni konas la fenomenojn, oni scias kiel ili reagas kaj kiel necesas kombini kaj kunigi ilin. Tial ankau estas kondiĉo ke tiuj homoj kiuj en precipa grado devas krei por la cetera homaro, inĝenieroj, arkitektoj,artistoj ktp.havas plurjaran edukon. Tio necesas ĉar ili devas lerni krei logike. Tio estas absoluta fakto en la materia sfero. Sed ni kreas ankau sur aliaj kampoj. Ni kreas per nia pensado, ni kreas rilatojn al aliaj homoj, al la bestoj kaj al ni mem. Ankau tio estas kreado kiu necese estu logika. En la spiritaj kreadoj estu logiko same kiel estu logiko en la fizikaj kreadoj.

La religioj emfazis ke oni estu bona kaj ama, kaj ke tiam la problemoj solviĝas. Tio estas

ja ĝusta, sed la problemo estas ke la religioj ne povas doni logikajn klarigojn al la moderna pensanta homo. Nuntempe la homaro havas kapablon percepti kaj kompreni multe pli ol antaŭe, kaj tial la homaro nun ricevas sciencon pri la animaj fenomenoj, sciencon pri konduto.

## La tri grandaj regionoj kie la homo formas sorton

Ekzistas do tri grandaj regionoj kie la homa sorto formiĝas. Tiuj grandaj regionoj estas la rialto de la homoj al siaj kunhomoj, al la bestoj kaj al sia propra organismo. En tiuj tri regionoj la homoj formas sian sorton, kaj tial estas tre grave komenci studi tiujn regionojn. Nun ekzistas la spirita scienco kiu povas gvidi ilin, kaj per kiu ili povas vidi kaj observi tiujn regionojn, vidi ankau kiel estiĝas tiuj multaj malfeliĉaj statoj.

## La rilato al la kunhomoj

La unua granda regiono estas la rilato al la kunhomoj. Kaj kia estas la nuntempa rilato de la homoj al siaj kunhomoj? – Ja ĝi estas iom pli bona ol tiam kiam la nordia mitologio estis la reganta religio, kaj kiam oni devis mortigi aŭ mem esti mortigita. Sed aliflanke ni vidas ke nun la homoj estas multe pli talentaj por mortigi kaj murdi ol iam antŭe. Ili posedas tiel grandiozan povon en la regiono de la mortiga principo ke baldaŭ ili eksplodigus la terglobon se ne pli altaj fortoj bremsus ilin. Sed tio ne okazos. Ekzistas registaro pli alta ol tiu de la homoj, mondregistaro kiu observas la evoluon de la homaro, kaj kiu ne permesas al la homoj agi pli vaste ol ĝuste necesas por ke ili povu ricevi la necesajn spertojn.

En la rilatoj de la homoj al aliaj homoj ni facile vidas ke okazas io ne bona. Ne estas bone mensogi, fraŭdi kaj envii aliajn homojn aŭ fariĝi amara aŭ kolera. Estas ĝuste ke tiuj aliaj homoj eble povas esti malagrablaj, ili eble kalumniis aŭ alimaniere ĝenis nin. Sed se aliaj homoj ĝenas nin, do tio estas energireago kiu estiĝas tute same kiel energireago en la materio. Ĝuste surbaze de tiuj reagoj oni formu sian konduton. Sed tiuj aliaj homoj kiuj kalumnias kaj ĝenas nin, kaj eble alimaniere ne estas tute agrablaj al ni, ili ne scias kion ili faras. Tio estas rezulto de ilia nefina stato. Se ni ne scius tion ni koleriĝus kaj venĝus, aŭ iamaniere venkus ilin. Sed per tio ni ja nenion atingis, tiam ni ja ne estas pli bonaj ol ili.

Oni ofte aŭdas la jenan: ”Vere maldecus postuli ke oni toleru tion”, sed tiu esprimo estas la plej malsaĝa kiu entute ekzistas. Oni devas toleri tion! – Eble ankau tio sonas malsaĝe, sed tion oni faru ĉar ĝuste tio estas la propra sorto kiu revenas. Ne troviĝas io ajn kio povas trafi nin sen tio ke antaŭe ni mem elsendis tion. Multe revenas de antaŭaj vivoj, sed tiam homoj diras: ”Kiel oni komprenu ke tion oni mem faris, kiam ne eblas memori tion?” –Sed tio tute ne dependas de memoro. Tiuj suferoj kiujn oni kaŭzis al aliaj, ili revenas kaj kreas novan kapablon en ni mem. Ili trejnas nin por fariĝi lertaj pri suferoj kaj lertaj por percepti suferojn de aliaj. La evoluo de tiu humana kapablo kaŭzas ke la homoj atingos ami sian proksimulon kiel sin mem. Tiu kapablo estiĝas pere de tiuj vangofrapoj kiujn aliaj homoj donas al ni. Ne la aliaj estas la unua kaŭzo de la vangofrapoj, sed ni mem estas.

Estas dia aranĝo ke kiam ni agas ni mem rericevos la efikojn. Se ni verŝas salon en nian

kafon ĝi fariĝas sala kaj ne dolĉa. Ne utilas koleriĝi ĉar ĝi ne fariĝas dolĉa. La substancoj efikas kiel ili devas. Tio estas ja la dia aranĝo.Spertante la efikojn de siaj agoj al aliaj estuloj la homoj sentetas kion ili faru kaj kion ili ne faru. Sed restas granda regiono kie ili ankoraŭ ne scias kion fari por esti logikaj kaj perfektaj. Ĝuste tie okazas la eksperimentoj. Ĝuste tie la homoj murdas, mortigas, turmentas, suferigas kaj kalumnias unu la alian. Praktikante la principon "okulon pro okulo kaj denton pro dento" ili kredas agi ĝuste, sed tie ili ekvidos ke tiamaniere ili neniam finos. Se la suferoj kaj reefikoj ne kreus tiun humanan kapablon ili neniam fariĝus finaj. Oni ne povas forigi militon per milito. Oni ne povas forigi sarkindaĵon semante sarkindaĵon. Tio estas ja tute malebla. Oni ne povas semi militon kaj rikolti pacon. Oni ne povas semi hordeon kaj rikolti tritikon. Oni necese ricevos tion kion oni semas. Dezirante pacon oni semu pacon. Tiamaniere oni povas vidi ke la situacio en kiu la homoj troviĝas, estas dia, kvankam ĝi estas doloriga kaj suferiga.

## La morto kiel liberiĝo

Sed estas ankau dia aranĝo ke ni havas organismon pere de kiu ni povas ricevi la suferojn. Ĝi ne estas nia vera naturo, ĝi ne estas ni mem, ĝi estas alkonstruaĵo al nia vera spirita strukturo. En formo de nia organismo tiu fizika alkonstruaĵo estas destinita parte por esti ilo kiun ni povas uzi kiam ni devas manifesti en la fizika materio, parte por esti speco de "laborvesto" kiu povas makuliĝi aŭ fariĝi neuzebla kaj de kiu ni povas liberiĝi pere de tiu proceso kiun ni nomas "la morto". Per la morto la "vera" homo liberigas sin de la doloroj, de la suferoj kaj de tiu eluzita korpo. De la spirita aŭ kosma flanko tio tute ne aspektas tiel malbone kiel de la fizika flanko. Ĉiuj kiuj mortas sur la batalejoj, ĉiuj kiuj subite mortas per akcidento ne multe suferas. Sed tiuj kiuj invalidiĝas kaj vivas la reston de la vivo, ili male ricevas iom da sufero, sed kiel dirite tio apartenas al ilia sorto.

## La humana kapablo kaj la cirkonstancoj en la futuro

Tiuj suferoj do perfektigas ilian humanan kapablon kiu estas tiel gravega. Ĝi igos la homojn kompreni unu la alian, kaj ĝi kunigos ilin por fariĝi unu popolo posedanta la tutan mondon tiel ke ne necesas tiuj multaj forte limigitaj kaj izolitaj nacioj kun dogano, pasportoj, restriktoj, valutaj malfacilaĵoj, cirkonstancoj de posedo ktp. Tio tute malaperos. Ĉio tio montras ke la homoj troviĝas en certa nefina stadio.

Nuntempe ĉiuj necese enspezas monon por savi sin dum la tuta vivo, ja tio fariĝis tia ĝeno ke ĝi retenas ilin en la plia evoluo. Ĉiutage multaj laboras kvazaŭ en tretmuelilo ĉar la laboro estas necesa malbono.Ĝi ne estas hobio. Sid iam la homoj progresos tiom en perfekteco kaj en amo unu al la alia ke ĉiu havos sian ĝustan lokon kaj laboros pri sia hobio. Se la homoj povus kompreni tion oni bone povus fari tiun aranĝon nuntempe. Sed ankoraŭ ili ne estas sufiĉe evoluintaj kaj sekve ne povas vidi tion. Tio daŭras. Tion oni ne povas aranĝi simple pere de nova politiko. Ne eblas akceli tion.

## La mondbildo estas helpo por mem observi

Ne estas nova politiko kaj ankau ne nova religio kiun mi volas fari. Mi havas nur la taskon rakonti kion oni vidas, kaj montri kiamaniere vidi tion, tiel ke oni mem povas kontroli miajn pensojn. Mi klarigas la tutan mondplanon kaj la sencon de la vivo kaj faras tion en formo de scienco. Kaj per tio la homoj ricevas apogon ĝis per siaj propraj spertoj ili mem povos konfirmi ĝin. Spertoj estas ĝuste tio kio necesas. La homoj ne povas

akcepti religion kiu ne konformas al la spertoj.

### *La individua grado de protekto*

Samgrade kiel oni ne partoprenas en protekto de aliaj estuloj oni mem estas neprotektita. Ĉiuj homoj havas gradon de protekto aŭ nivelon de sia sorto. Nuntempe iuj homoj neniel povas sperti tiujn akcidentojn kaj malfeliĉojn kiuj subite trafas aliajn. Nuntempe iuj homoj neniel povas akcidenti per flugmaŝino, dum aliaj povas. Ĉiu unuopa el ni havas sian propran individuan specialan gradon de protekto, kaj ĝi estas bazita ĝuste sur tiu protektogrado en kiu ni mem protektas aliajn.

### *La rilato al la bestoj*

La alia granda regiono estas la rilato de la homoj al la bestoj. En sia sovaĝa stato la homoj kutimiĝis murdi, mortigi kaj manĝi la bestojn, kvankam Dio diras al Adam ke li vivu per la kampaj herboj. Sed diversaj okazaĵoj en la mondo kaŭzis ke la homoj kutimiĝis manĝi animalan nutraĵon. Tiu animala nutraĵo ne estas homa nutraĵo. Sed oni ne povas tuj ĉesi uzi animalan nutraĵon, kaj mi ne kritikas tiujn homojn kiuj manĝas ĝin, tion oni ne kredu. Mi rakontas nur kiel ĝi estos forigita, kiel oni forkreskos de ĝi kaj kio poste okazos. Tiel longe kiel oni kunagas por mortigi la bestojn kaj oni manĝas iliajn organismojn, tiam la propra protekto reduktiĝas. Tiu reduktiĝo povas kunefiki tiel ke pli facile ol alie oni estos trafita de akcidentoj, kripligoj kaj suferoj.

Ne estas vivkondiĉo manĝi animalan nutraĵon, sed male estas pli sanige kaj multe pli bone por intelektaj homoj vivi per “la kampaj herboj”, kiel skribite. Tial la homoj ankau ne povas liberiĝi de sia malluma sorto tiel longe kiel ili estas viandomanĝantoj, tiel longe kiel ili murdas kaj mortigas la bestojn, tiel longe kiel ili tenas ilin enkaptitaj kaj krome tenas ilin en tiuj teruraj statoj kie oni bredas ilin nur por akiri iliajn felojn. Estas evidente ke en menso kiu povas bredi centojn da etaj bestoj nur por senfeligi ilin, tie estas manko de humana sento.

Kiel oni akiru tiun humanan senton? – Ne efikas diri al tiuj kiuj murdas, mortigas, ĉasas kaj plezurfiŝkaptas, ke pro tio ili mem suferos kaj ke tio revenos al ili mem. Tie ne helpas klarigoj, predikoj aŭ juĝotagaj paroloj. Kaj tute neniel utilas fariĝi amara kaj kolera al ili kaj doni malican kritikon. Ĝuste la humana kapablo necesas. La okazaĵoj revenos al tiuj kiuj kaŭzis ilin al la bestoj, ili mem ricevos tiujn suferojn kaj dolorojn. Tio revenos al ili mem en formo de iuspecaj malsanoj, akcidentoj aŭ suferoj. Tiam kreskas la sento, kaj ili komencas kompreni kiel estas esti malsana, kiel estas senti hokon eltirata el la korpo tiel kiel okazas al la fiŝoj. Tial la homoj komencas percepti tiajn okazaĵojn. Troviĝas homoj kiuj preskaŭ svenas se ili vidas ke fiŝkaptistoj kapablas duonŝiri la fiŝon por eltiri la hokon. Ni vidas tiun diferencon de humana kapablo. Kiel dirite, mi ne prezentas tion por kritiki, sed por montri kio okazas, kaj kion ni vidas. Laŭ la suferoj kaj la evoluo pliboniĝas la kapablo observi la vivon, kaj konforme al la propraj spertoj de sufero la spirita scienco povas esti granda helpo.

## La rilato al la organismo

La tria granda regiono estas la rilato de la homoj al sia propra organismo.Tie estus kredeble ke ili povas ami sin mem, sed tion ili tute ne faras, kontraŭe. Multaj homoj estas

terure kruelaj al sia propra organismo, kaj tio trafos ilin. La organismo estas ilo por la homo. Ĝi devus povi teni dum la kalkulita tempo de ĉ. 70 jaroj, kaj ĝis tiam la homo ja ankau prefere estu spirite freŝa. Nuntempe la homo eĉ povu fariĝi pli aĝa pro la pli alta evoluo. Sed tiu pli alta evoluo kondukis la homojn ankau en novajn eksperimentojn kiujn la bestoj tute ne povas partopreni. Ili enkorpigas multege da substancoj kiuj tute ne estas nutraĵo aŭ trinkaĵo. Ili plenigas sin per alkoholo, nikotino aŭ narko kiuj tre subfosas la organismon kaj kiuj terure suferigas la etajn mikroestulojn el kiuj ĝi konsistas. Poste povos estiĝi ankau aliaj teruraj statoj. Ekzemple ni aŭdas pri tio kiel plurjara fumado de tobako povas estigi kanceron en la pulmoj.

Ofte homoj trinkas bieron aŭ alkoholon kiam ili kunestas. Kial ili ne povas est kune sen io kio difektas la korpon? – Ekzistas multaj homoj kiuj havas luksajn aŭtomobilojn kiujn ili tre zorge flegas. Ili purigas kaj poluras ilin, donas al ili la ĝustan benzinon kaj la ĝustan oleon. Sed sian propran korpon kiu estas la plej delikata organismo kiu entute ekzistas, ĝin ili plenigas per multe da fatraso kiu difektas kaj detruas ĝin, kvankam ĝi vokas kaj krias ke tio estas erara. Komence ili povas senti ke la tabako kaj la alkoholo ŝiras kaj disŝiras ilin, sed tion ili venkas, kaj per tio ili komencas subfoson de sia vivfeliĉo kaj sia vivtravivado. Eĉ tre intelekta homo kun atingo de certa  grado de humaneco povas fariĝi drinkulo kaj tre malboniĝi. Oni kutimiĝas al tiu malvirto, kaj ĝi ekregas ĉar en la organismo enkarniĝas pli primitivaj mikroestuloj kiuj postulas tiun ĝuon. Ili ne povas plenumi la samajn kondiĉojn kiel la normalaj mikroestuloj, kaj tial la organismo degeneras.

Sed la plej granda malbono estas ke detruiĝas tiuj organoj pere de kiuj oni pensas, la cerbo kaj la nervoj, kaj la homo ruiniĝas. Se tio ne ĉesas, sed havas okazon daŭri, tiam la homo fariĝas komplete mensmalsana. Ni vidas ke naskiĝas multaj mensmalsanuloj, sed kiamaniere oni povas perdi aŭ difekti ĉiujn sensojn? Tio povas okazi nur pere de io neperfekta. Per io perfekta tio ne eblas. La hospitalojn oni konstruas pli kaj pli grandaj. Ili ne povas enhavi ĉiujn kiuj malsaniĝas. Ni vidas multajn nervozajn kaj mensmalsanajn homojn en hospitaloj kaj nervoklinikoj. Ni vidas ke la homoj tiel altgrade malatentas tiun sian plej altrangan ilon. Tio tute ne okazas ĉar ili estas malicaj, sed ĉar tio fariĝis kutimo. Tio fariĝis moderneco, io kion la aliaj faras kaj sekve de kio oni ankau mem faru. Sed tio estas malsaĝa stato. Necesas lerni vidi kio estas la ĝusta, kion oni faru kaj kion oni ne faru. Eĉ se la tuta homaro faras ion eraran oni ne mem bezonas fari tion.

La homoj ne devas daŭre esti gregohomoj, sed sur la nuna ŝtupo ili similas unu la alian. Kiam estiĝas modo oni devas porti specialan veston, havi apartan frisaĵon aŭ apartojn botojn aŭ ŝuojn. Kiam unu havas plenbarbon do ankau alia havu, aŭ se unu havas lipharojn do ankau alia havu lipharojn. Tion oni ne kritiku, ĉar estas tute nature kaj memkompreneble sur tiu ŝtupo. Tio ne estas io speciala kaj ĝuste ne estas la kerno. Esence ni ĉiuj estas speciale individuaj, kaj kiam la homo fariĝos perfekta, fariĝos geniulo, tiam ĝi estos floro en komplete individua koloro.

## *La scienco de la futuro montras la vojon*

Observante tiujn tri regionojn la homoj povos kompreni sin mem. Oni povas diri al si mem: Kiel mi kondutas al miaj kunhomoj? – Kion mi faras al la bestoj? – Kion mi faras

al mi mem?- Se ĉiutage la homoj koncentras sin iom pri tiuj tri regionoj, tiam ili havas kvazaŭ grandiozan landmapon malfermitan antaŭ si kaj tie povas vidi kiun vojon ili iru kaj kion ili faru. Ĝuste tio estas la scienco de la futuro. Treege multe ĝi helpos al la homoj kompreni kion ili faru.

## *La homoj mem havu la sintenon peti pri helpo*

Sed tiu scienco de la futuro ne povos helpi la homojn antaŭ ol ili komprenos aŭ perceptos ke ili bezonas helpon. Tiam la situacio estos tute sama kiel kiam la homoj estas mortintaj de la fizika korpo kaj venas en la purgatorion en la spirita sfero. Se ili ne estas humilaj kaj ne opinias ke ili bezonas helpon, tiam la gardanĝeloj ne povas helpi ilin, kaj tiam ili restu en tiu malagrabla vivo en la purgatorio ĝis ili krios pri helpo. Oni ne povas helpi homojn kiuj bezonas helpon, sed ne estas pretaj ricevi ĝin. Kaj tion montras ekzemple tio ke altgrade oni vane skribas pri la damaĝaj efikoj de la tabako kaj montras tion pere de filmoj. Mi ne mencias tion por kritiki la fumantojn, sed por ke oni povu vidi ke tio ne efikas al ili. Ili ne perceptas tion, ili ne komprenas ke iam iliaj pulmoj povos esti difektitaj. Sur multaj aliaj kampoj ili ankau ne komprenas kio estos la sekvoj de iliaj agoj.Kiam ili diras ion teruran aŭ tre malestiman, ion mortigan aŭ malĝojigan al aliaj homoj, ili ne pensas ke per tio ili konstruas sian propran sorton. Per tiaj ”brikoj” ili konstruas sian sorton kaj ne komprenas ke tiu konstruaĵo nepre ruiniĝos ĉar ĝi estas konstruita tiel terure mallogike.

## *Toleremo al ”neplenaĝuloj”*

Se troviĝas homoj kiuj ne estas bonaj al ni, kiuj kalumnias nin, tiam necesas kompreni ke laŭ mensa vidpunkto ili estas ”beboj”. Oni ja ne koleras ĉar eta infano krias en la lulilo kiam oni preteriras. Oni ja ankau ne acidiĝas ĉar hundoj bojas. Malnova vorto diras: ”Lasu la hundojn boji, kaj la karavano tamen preterpasas”. Se okazas io tro terura, tiam ja troviĝas aŭtoritato kiu prizorgas ke oni ne vere bezonas esti mortigita. Multajn okazaĵojn oni povus haltigi en la komenco tiel ke ne okazas granda dramo, sed multaj havas jenan senton: ”Vere maldecus postuli ke mi toleru tion!”  Kaj se ili ricevis alkoholon do estas multe pli grave, ĉar tiam ili ja estas veraj ”Goljatoj”. La homo neeviteble troviĝas sur sia ŝtupo. Oni ne povas postuli ke homo staranta sur unu ŝtupo reprezentu ŝtupon  pli altan. Necese ĝi reprezentas la neperfektecon de tiu ŝtupo. Se iu staras sube oni eltenu ke ĝi havas manierojn kaj kutimojn apartenajn al tiu nivelo. Necesas trovi formon pere de kiu oni povas kontaktiĝi kun ili. Homoj troviĝantaj pli supre ĉiam estas pli bonaj kaj pli agrablaj ĉar ili ja atingis pli altan gradon de humaneco.

## *La preĝo – dia magio*

En tiuj multaj malfeliĉaj sortostatoj estiĝas grandega sopiro veni en pli bonan staton, kaj por tio ĉiuj homoj ricevis la preĝon – tiun dian magion – kiel naskiĝodonacon. La preĝo estas nome aŭtomata enkonstruita mekanismo kiu ekfunkcias kiam oni venas en danĝerajn situaciojn. Kiam la besto venas en vivdanĝeron ĝi krias, kaj kiam homo venas en terurajn katastrofojn aŭ estas en akuta vivdanĝero, tiam tiu aŭtomatiko ekfunkcias kaj ĝi direktas sian konscion al la providenco. Eĉ ĉe la tre materiisma homo kiu ne kredas je Dio, tiu aŭtomatiko ekfunkcias en aktualaj situacioj.

Sed la senco ne estas ke ĝi ekfunkciu nur en tiaj speciale krudaj statoj. Ĝi estas magio

uzebla en ĉiu situacio. Oni povas preĝi pri helpo kiam oni havas la bezonon. Jesuo diris: “La Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo”. (Joh.15.16). Sed kion signifas preĝi en ”la nomo de Jesuo”? – Tio signifas preĝi en tiu maniero kiel faris Jesuo. Li preĝis tiel: ”Patro, plenumiĝu ne mia volo, sed via”.(Luk 22.42). Ĉar la volo de Dio estas ĝuste tio ke ni ŝanĝiĝu de besto al homo, tiam estas evidente ke tiuj realaĵoj kiuj devas ŝanĝi nin, estas la volo de Dio, kaj ni ne preĝu por liberiĝi de ili. Sed male ni povas preĝi por ricevi grandegan forton por elteni tiujn suferojn kaj ĉion kion ni trairu.

Tion faris ankau Kristo. Post la preĝo en Getzemano al Dio li povis elteni la krucumon kun la plej granda mensa trankvilo, kaj li eĉ ne kontraŭetis. Li bone povus fuĝi, sed tiam lia misio malsukcesus. Sur la kruco li devis montri ĝuste tion kio estas la granda celo. Li devis montri ke eblas toleri eĉ la plej grandan ofendon. Pendanta sur la kruco kun sia tuta pezo kaj kun najloj tra la karno en terura sufero li povis diri: “Patro pardonu ilin, ĉar ili ne scias kion ili faras”.(Luk.23.34). Tion li povis elteni sen ofendiĝo. Tiuj homoj kiuj ne estas bonaj al ni, “ili ne scias, kion ili faras”. Sur la kruco sur Golgoto Kristo montris ke la vojo kondukas al la lumo per tio ke oni pardonas al sia proksimulo kaj lernas kompreni liajn neperfektaĵojn, kaj scias ke anstataŭ ol fariĝi amara kaj kolera oni helpas lin per sia propra amo.

Prelego en 1959, prilaborita de Ole Therkelsen kaj akceptita de la konsilio.

Trad. Ib Schleicher